



# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Majo : 3 2022

## UNUA AKUZITO JUĜOTA PRI MILIT-KRIMOJ EN LA MILITO DE RUSIO KONTRAŬ UKRAINIO

La pasintan vendredon komenciĝis en Kievo, la unua jura proceso kontraŭ rusa militisto akuzita pri milit-krimoj dum la invado de Ukrainio fare de la rusa armeo. Ekde la komenco de ĉi tiu milito la ukrainiaj aŭtoritatoj esploras, ofte kun helpo de fakuloj de aliaj landoj, milojn da denuncoj kontraŭ rusaj soldatoj akuzitaj pri murdoj de civiluloj kaj seksaj perfortoj en Ukrainio.



Laŭ la oficejo de la ukrainia prokuroro, oni jam sciigis pri pli ol 10.000 denuncoj pro milit-krimoj, same UNICEF informis pri la murdo de pli ol 100 infanoj dum la milito.

La rusa soldato akuzita en ĉi tiu unua jura proceso estas la serĝento Vadim Shysimarin, 21-jaraĝa, suboficiro en tanko-brigado. La prokuroro akuzas lin pri la murdo de senarma civilulo en la vilaĝeto *Chupakhivaka*. Tio okazis la pasintan 28-an de februaro, tiam la rusa soldato estis ene de rusa tanko kiu ricevis atakon de la ukrainia armeo. La soldatoj forlasis la tankon kaj ili ŝtelis aŭtomobilon kun la celo fuĝi.

En la vilaĝeto Chupakhivaka la soldatoj rekontis homon, kiu sur bicikle iris lokon por serĉi manĝaĵojn. Samtempe li uzis sian porteblan telefonon. En tiu momento la soldato pafis kontraŭ la civilulo, li timis, ke li povus informi pri la ĝusta situo de la rusaj soldatoj. Tamen la soldatoj perfekte vidis, ke la civilulo ne havis armilojn.

En tiu fuĝo ukrainiaj soldatoj kaptis la rusajn militistojn. Se la rusa soldato ricevas kontraŭan juĝon, li povus esti kondamnita al enprizonigo, inter 15-jara kaj porĉiama.

# *Vorto de la Semajno*

**Armistico:** Milit-paŭzo, difinita per detala skriba konvencio, kaj pli grava ol simpla batal-halto.

Sinonimoj: *milit-paŭzo, batal-halto.*



*Ĵurnaloj informas pri la armistico kiu metis finan punkton al la kombatoj de la unua mond-milito.*

## ***Kio estas armistico ?***

Armistico estas provizora milit-paŭzo akordita de la partioj kombatantaj en milito. Armistico ne nepre signifas finon de tiu milito, tamen ĝenerale jen la komenco de la diskutoj cele atingon de definitiva pac-akordo. Armisticoj povas esti ĝeneralaj, se la milito haltiĝas en ĉiuj batal-frontoj, aŭ lokaj, se tio okazas nur en kelkaj lokoj aŭ sektoroj.

Akorde al la Konvencio de Hago de la jaro 1899, armistico ne finigas militon, ĉi tiu nur finiĝos kiam oficiala pac-deklaro estos atingata. Ĉi tiu konvencio ankaŭ disponas, ke la kondiĉoj de ebla armistico devas esti alprenataj de la partioj kaj poste oficiale komunikataj. Same, se unu el la partioj rompas la armisticon, la cetera aŭ ceteraj partioj rajtas denunci ĝin kaj eĉ ekigi denove la kombatojn, kvankam se ĉi tio okazas oni devos informi pri tio al kontraŭuloj.

Ofte oni povas uzi similajn vortojn kiel milit-paŭzon, baltal-haton kaj pac-akordon, eĉ kelkaj rezolucioj de Unuiĝintaj Nacioj miksigas ĉi tiujn terminojn, tamen inter ili ekzistas nepraj malsimilaĵoj. Se ni parolas pri pac-akordo, estas necese diri, ke tio signifas, ke la partioj trovis akordon por fini la militon.

Rilate militi-paŭzon, ĝi temas pri provizora ĉeso de la milito kun specifa celo, ekzemple la evakuo de civiluloj kiuj troviĝis ene de sieĝita urbo, aŭ la urĝa prizorgo de vunditoj. Ofte tiu milit-paŭzo povas esti trudata aŭ aŭspiciata de internacia organizaĵo kiel Unuiĝintaj Nacioj aŭ la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco. Fine, se ni parolas pri batal-halto, ĝi estas la konkreta ĉeso de kombatoj antaŭ la milit-paŭzo aŭ la armistiko.

Kaj se paroli pri famaj armisticoj, eble la plej konata estis tiu subskribita la 11-an de novembro de 1918, en la franca arbaro *Compiègne* ene de vagono. Tiam, reprezentantoj de Germanio, Francio kaj Britio metis finan punkton al la kombatoj de la unua mondmilito. Tamen, estas necese averti, ke ĉi tiu milito daŭriĝis ĝis la subskribo de la Traktato de Versajlo en la monato junio de 1919.



*Subskribo de la armistiko de Compiègnes en la jaro 1918*

Alia tre konata armistiko estis tiu atingita dum la milito de la Korea Duoninsulo en la jaro 1953. Kombatoj tiam finiĝis, tamen el la teknika vidpunkto milito ankoraŭ daŭriĝas, ĉar neniu pac-akordon oni subskribis post tiu momento.